

# Juna Esperantisto

Monata Gazeto Beletristika  
por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj

Jara abono : 2 fr. 50.

33, rue Lacépède — PARIS — rue Lacépède, 33

## MALJUNULA RUZO

En vilaĝeto vivadis maljunulo, fraŭla kaj avara, kiu havis nomon Ilarkoko.

La loka loĝantaro ja suspektis, ke tiu simplulo, preskaŭ neniom elspezanta, sendube estas riĉa, posedas dikajn sakojn da moneroj kaj oron plenmonuje; sed, post la opinio, ke li kredeble estas riĉulo, ĝia sciemo estis kontentigita.

Tamen ne estis sama lia pleja najbaro, Malfaremo, prave nomata tial, ĉar, profesie lignaĵisto, li pasigis sian tutan tempon drinkante, anstataŭ manuzi lignorabotilon.

Malfaremo, ne ĝenate de moralaj principoj, iam ĵurpromesis al si baldaŭ scii pri la loko, kie la maljuna Ilarkoko kaŝas sian trezoron.

En tiu celo, sian najbaron li spionadis nokte kaj tage, uzante mil ruzojn, sin kaŝante en fluejon aŭ post densaĵtufon, arbojn suprenrampante...

Post dumonata sistema spionado, Malfaremo fariĝis certa.

Vidinte, multokaze, Ilarkokon fosilesplori, sen iu motivo, piede de pirujo el sia ĝardeneto, li opiniis, ke tie sendube kuŝas la kaŝejo.

Iun nokton, la ĉirkaŭigan plektobarilon li trapasis, kaj, provizite je ŝovelilo, li siavice subfosis apud la pirujo.

Efektive li trovis enŝovitan sub proksimume duonmetro da tero, malnovan ferpoton, en kiun estis kaŝita ĝusta sumo da du cent spesmiloj, sub formo de belaj luidoroj.

Senutile estus aldoni, ke Malfaremo ilin ekkaptis.

La poton li relokis, la teron per kiu li ĝin rekovris, elpremis, kaj rapidis hejmen, tre feliĉa pro la neatenditaĵo.

Tuj morgaŭe, Ilarkoko, rimarkante ke la kovranta lian valoran ferpoton tero estis sendube movita, eksuspektis.

Li deprenis iom da grundo kaj konstatis, ke lia poto estas malplena je ormoneroj.

— Ŝtelita ! Mi estas ŝtelita ! Oni senmonigis min abomene ! — ekkriis la maljuna Ilarkoko.

Liaj suspektoj ne eraris longtempe.

— La kulpulo, — li fine diris, — nur estas tiu bandito Malfaremo ! . . . Ha, se lin mi tenus ! . . .

Bedaŭrinde, lin li ne tenis. Kaj, plie, malfortigita de l' aĝo, Ilarkoko estus certe venkita en lukto kun Malfaremo, fortika kaj ne pli ol tridek-kvin jara.

Prefere per ruzo la maljuna Ilarkoko luktos kontraŭ sia rabinto.

Ja, la maljuna avarulo estis ruzproduktema.

Tuj morgaŭe, ne pli malfrue, li iris al sia najbaro.

— Amiko, — li diris per miela voĉo, — mi deziras peti de vi konsilon. . .

— Tre bone, pri kio la afero ?

— Jen. . . Ĉar mi loĝas sola en mia domo, kaj oni opinias min riĉa en la lando (malprave, sed tiele) mian tutan ŝparaĵon mi enfosis en ferpoton. Ĝi egalvaloras du cent spesmilojn. . . Sed, la notario ĵus pagis al mi kvar cent spesmilojn, ŝulditajn al mi jam de post kvin jaroj de nepagemulo. . . Ĉu vi ne konsilas al mi meti tiujn kvar cent spesmilojn en mian ferpoton kun miaj ceteraj du cent. . . aŭ ĉu vi konsilas serĉi alian kaŝejon ?

La respondo rapidis alveni :

— He ! per Dio, jes, najbaro, vian tutan monon vi devas meti en la saman sakon. . . eĉ se tiu sako estas poto kaj precipe se tiu poto estas bone kaŝita.

— Pri tio mi garantias !

— Tiam, eĉ momenton ne ŝanceliĝu plie. . .

La najbaroj disiĝis.

Tial ke Ilarkoko estis anoncinta, ke li estas ironta la proksiman urbon, Malfaremo rapidegis kapti la okazon de la foresto de sia najbaro por reloki en la ferpoton la de li forrabitajn du cent spesmilojn.

Tio okazigis ke, je sia reveno de la urbo, al la maljuna kaj divenema Ilarkoko sufiĉis nur iri elterigi sian ferpoton kaj reposedi siajn du cent spesmilojn.

Pri Malfaremo, tio preskaŭ havigis al li la flavmal-sanon, kiam la sekvantan nokton, ŝtelfosinte sube de l'pirujo, li trovis nek la ses cent de li avidatajn spesmilojn, nek eĉ la feran poton.

El « Lyon Républicain » tradukis MAURICE DAVID.

~~~~~  
❧ Somero. ❧

*Antaŭ modesta kampara domo  
Sidas sur benko gemaljunuloj,  
Kaj vokas nepojn, laŭ ĉies nomo,  
Zumantajn, kvaŝaŭ vesperaj kuloj.*

*Ho, kiom, kiom estis la peno!  
Mi superversis arbon somere,  
Vindigis vintre per pajlfadeno,  
Kaj kontraŭ vermoj flegis sincere.*

*Sur arbetoj kantas birdetoj,  
Freŝa venteto dolĉe murmuras,  
Sed la pepado de genepetoj  
La gejunulojn pleje plezuras.*

*Kaj kreskis, kreskis nia pirarbo,  
Kaj kiam estis mi jam matura,  
Elkreskis granda, branĉlarĝa arbo,  
Bonrikoltiga arbo statura.*

*Ho, ili lastan kanton eksonos  
Super iliaj kapoj frostigaj,  
Ili gevojn al ter' redonos...  
Kaj ekĝemetis koroj lacigaj.*

*Kiel ekguas vi, la piretojn,  
Tiel ĝojigas viaj paĉjetoj  
Vidante siajn geinfanetojn...  
Ho, floru, kresku, miaj nepetoj! »*

*Floru trankvile, bela somero,  
Sen fulmotondroj, sen la ventego!  
Sana rikolto — tuta espero...  
Gardu ĝin Dio de la sekego!*

*Ho, ni promenu al la kamparo,  
Ĉar grenaj kampoj jam plensflavigis,  
Kaj la bongustaj, en la arbaro,  
Fragoj kaj beroj jam maturigis.*

*« La infanaro al mi rapidu...  
— Eksonis voĉo de la aveto, —  
Sufiĉe kuri, vi, al mi fidu;  
Mi diros ion sub la sekreto.*

*Ho, kiel varma la nuna tago!  
Do ni nin kaŝu sub ombra pino,  
Sur herba bordo de l'bela lago  
Kaj sur benketo revu sen fino...*

*Ronde sidigu... » Kaj l'infanaro  
Tuj eksidigis sub la pirujo,  
Milde, gentile, paro post paro,  
Sub ombra arbo — vera ĉarmujo.*

*Neĝblankaj cignoj naĝas fiere;  
Jen malproksime pasas boatoj,  
Kaj sur la lago ofte vespere  
Aŭdigas kanto de l'geamatoj.*

*« Kiam mi estis ankoraŭ bubo,  
Tiu ĉi loko estis et'-monto  
Supersutita per mult' da rubo...  
— Jen komenciĝis ava rakonto. —*

*Ho, revu, trilu la juna paro  
Dum libertempo post la laboro,  
Nia amata la junularo!  
Ho, batu noble via la koro!*

*Arangis mia paĉjo loketon...  
Elfosis largan, profundan kavon,  
Kaj plantis belan la pirarbeton;  
Vi mian bone divenas raven...*

*Post la laboro kaj noblaj faroj,  
Riĉan rikolton alsendos Dio,  
El koroj viaj fermigos paro  
Nur modulantaj per simfonio.*

*Vi estas nia frukta ĝardeno,  
Vi estas nobla nia floraro,  
Vi por gepatroj estas la beno,  
Vi estas nia grena kamparo!*

*Gardu vin Dio de la putriĝo,  
Kaj viaj koroj de la ventego!  
Ho, bona estu la maturiĝo,  
Tute sen vermoj kaj ŝima tego.*

*Ho, vi gepatroj kaj profesoroj,  
Zorgu kaj flegu la junularon,  
Kaj ekĝojigos viaj la koroj,  
Vi plej grandegan ekfaros faron.*

*Ĉar la laboro por junularo —  
Nia plej dolĉa sola espero,  
Per kiu vivas, floras homaro  
Estas plej grava tera afero.*

*Ho, la aliaj grave diskutu  
Pri diversspecaj grandaj problemoj,  
Vi bonajn semojn ĉien disŝutu,  
Brave, kuraĝe, sen iaj tremoj...*

*Brave, en ĉiu, ĉiu posteno,  
Kaj kredo, kredo la oraj homoj,  
Ke la feliĉo kaj Dia beno  
Super la viaj ekbrilos domoj!*

D-ro ANT. VJEĈORKJEVIĈ.

## DEZIRO DE LA DIAKONO

Novelo, de SERGIO MARTOS.

Dio, verŝajne nenio estas pli bela en la mondo, ol la printempo ĉe ni, en Ukraino! Estas iel gaje, kiam vi rigardas sur la mondon Dian: ĉie estas bone, verdaje, eĉ la spirito gajas! Kaj stepo, kaj herbejo, kaj verda arbareto, kaj ĉiu birdeto, kaj ĉiu dia kreitaĵo, sendas al Dio laŭdon pro Lia granda boneco. Jen rigardu: ĉe vojrando ekflugis alaŭdo kaj sin direktis eĉ sub la ĉielon mem, pepante sian gajan, amuzan kanteton.

Kaj jen en verda greno ekpepis koturno, — ĝi vokas sian amikinon, por dividi kun ŝi tiun mangajon, kiun ĝi trovis. Kaj jen en la verda herbejo malgranda najtingalo ekpepis sian mirindan kanton. Kiu ne lasus sin aŭskulti tiun kanton? Al kiu tiu kanto ne dispelus malgajon?... Tiu kanto estas, jen gaja, ĝoja, jen kvazaŭ sopira, jen trankvila kaj karesema, kiel la amo de juna knabino. Kaj jen en malhela arbareto ekkukis senparenca kukolino, sopirante, ke la malafabla sorto, kvazaŭ mokinta ŝin, lasis al ŝi ekkoni nek paron, nek la varman nesteton, nek la proprajn infanetojn...

Ne malproksime de la verda arbareto etendiĝas nia negranda vilaĝo. Kvazaŭ ĝi tuta estas envolvinta en la ĉerizajn ĝardenetojn; inter la ĝardenetoj rifuĝas negrandaj blankaj dometoj.

En la ĝardenetoj floras ĉerizujoj, merizarboj, pomarboj kaj pirujoj.

Ĉirkaŭ la dometo diskreskis odora levistiko (1), malvarma

(1) Latine: Levisticum officinale.

mento, kaj pompa malvo. Ankaŭ ĉi-tie diskreskis kruca vinko, kvazaŭ per verda tapiŝo kovrinte la teron.

Ĉe la pordego troviĝas puto el kverka laboro kaj kun knariga akvotirilo. Apud la puto kreskas flekseblaj kaj altekreskaj popoloj, kiuj ĉiam bruetas per siaj argentkoloraj folioj. . . .

Kaj jen estas preĝejo Dia, blanka kaj bona, pure lavita de printempaj pluvetoj, kaj sekigita de la hela, varma suno.

Staras ĝi kvazaŭ en la florkrono: ĉerizujoj, merizujoj, odora sambuko, morusarboj, iaj aliaj arboj kreskas kaj floras ĉirkaŭ ĝi.

Ne malproksime de la preĝejo, sur la verda placo staras vilaĝa lernejo.

Apud ĝi, en malgranda korto, ĉe unu flanko staras brutstaloj kaj kelo, ĉe la alia — stalo kaj sentegmenta porkejo. Meze de la korto staras, tegmentita per kano, negranda dometo kun perono, kaj al ĝi kondukas tri ŝtupoj. Sur la perono pendas kusenoj, krudtolaĵoj, kuŝas siteloj kaj vektio. Tio ĉi estas preĝeja korto por la diservistoj.

Krepuskiĝas. La suno jam komencis ŝubeniĝi por ripozo.

La venteto trankviliĝis, tial la popoloj, kiuj ĉiuj bruetas per siaj folioj, kvazaŭ mallaŭte parolante inter si, ankaŭ ili silentiĝis. . . nur estas aŭdate, kiel kantas najtingalo jen en la herbejo, jen en la verda arbareto.

Hirundino la lastan fojon portas en la beko plumeton en sian nesteton, por ke morgaŭ frumatene ĝi rekomencu sian laboron. . . .

Kaj jen iĝas aŭdate, kiel post la vilaĝo eklektas ŝafaro, de komunuma ŝafisto pelata hejmen. Kun la ŝafaro iras gebovoj.

Eknaris, malfermiĝante, pordego kaj en la preĝejan korton eniris du grizaj bovinoj; alpelis ilin granda dikpieda knabino, — nigreca kaj grandnaza; ŝia buŝo estas granda, kaj ŝi havas grandajn dentojn.

En tiu korto loĝas la vilaĝa diakono, — Andronik Polikarpoviĉ Bogdannij. La knabino, kiu alpelis la bovinojn, estas lia plej aĝa filino, la dudekjara Ksenio.

Ferminte la pordegon, ŝi, kvazaŭ sendezire, iris sur la peronon, starigis sian bastonon en la anguleton kaj poste eniris la domon.

En la unua ĉambro estis forno; apud ĝi bolis samovaro (te-maŝino). Sur la terplanko rampadis en nura ĉemizeto malpura knabeto. Sur la sojlo de la alia ĉambro staris negranda knabineto kaj rigardis, ke la knabeto ne alrampu al la varmega samovaro.

Ksenio eliris kaj staris super la elversajujo por lavi siajn manojn.

— Kiu estas tie? — demandis iu el la tria ĉambro.

— Ĝi estas mi, — diris Ksenio, viŝante per tuko la manojn.

— Ĉu, — vokis ree de tie, — la patro forestas?

— Forestas, — respondis Ksenio.

— Nu, lavu viajn manojn, poste enportu la samovaron, ĉar la patron ni ne ĝisatendos. . . Atendi oni ja ne havas tempon, — baldaŭ venos la tempo por dormi.

Ksenio prenis la samovaron kaj enportis ĝin en la alian ĉambron.

Tie, apud la muro, staris longa kaj larĝa kanapo, kaj antaŭ ĝi granda tablo, kovrita per hejme farita tablotuko. Ne malproksime de la kanapo, en angulo staris bufedo, — tie sur la kvar bretoj estis dismetitaj portea kaj pormanĝa ilaro. Supre staris glaso, pladetoj, verda argila tekruĉo kaj vitra sukerujo kun kovrilo. Sur la malsupraj bretoj estis teleroj, supujoj, duonsupujoj, tranĉiloj, forkoj kaj kuleroj. Sur du kuleroj, sur la ekstremaĵo de la tenilo, estis eltranĉita benanta mano. Apud la tablo kaj en la anguloj staris benketoj kaj maldekstre pordo kondukis en la trian ĉambron.

Ksenio enportis la samovaron, kaj post ŝi la malgranda fratino Manjo enportis negrandan pecon da fera folio kaj metis sur la tablon, — sur ĝin Ksenio starigis la samovaron. Poste ŝi prenis el la bufedo verdan tekruĉon, el la fera skatolo ŝutis en ĝin iam da tio, plenverŝis la tekruĉon per akvo kaj starigis ĝin sur la samovaron.

En la ĉambro, kiu estis maldekstre, apud unu muro staris larĝa lito, kun tuta amaso da matracoj kaj kusenoj. Laŭlarĝe de la lito kuŝis elpendiginte de ĝi malsupren la piedojn, kaj dormetis la malpliaga ol Ksenio filo de la diakono, Gregoro, — knabo ĉirkaŭ deknaŭjara, kiu laboradis ie ĉe forĝisto.

Sur la terplanko sidis pli malgranda ol Gregoro knabo, Mikaelo, kaj faris kaĝon el ferfadeno. Apud la alia muro staris ankoraŭ unu lito, sed sur ĝi jam ne estis iom da kusenoj. Tie ĉi ankaŭ kuŝis, sed ankoraŭ pli malgranda, knabo Stefano, balancis la piedojn, krietis kaj ludis kun kato. Apud li sidis knabino, kaj flanke rampadis la malpura knabeto, kiu estis en la unua ĉambro, kaj ludis nun kun du malgrandaj hundidoj, kun Dzvinka kaj Stribunec. Apud la tria muro staris kanapo kaj antaŭ ĝi ankaŭ staris tablo; ĉe tiu tablo sidis ankoraŭ unu filino de la diakono, Monjo, kaj preparis el papero florojn. Sinjorino diakonedzino mem, Eŭdokio Gerasimovna, sidis kun ŝi apude, metinte sur sian grandan ventron la manojn kaj ludis per la fingroj. Virino ŝi estas granda, altkreska, larĝa en ŝultroj, manojn ŝi havas ruĝajn kiel buĉisto, ankaŭ ŝia vizaĝo estas ruĝa.

Jarojn ŝi havas ne pli ol kvardek, aŭ kvardek du. Sidis ŝi kaj rigardis, kiel lerte Monjo faras florojn. . . Monjo estis ĉirkaŭ deksesjara; ŝi estis blondhara, blanketa kun ruĝaj vangetoj kaj lipetoj. Monjon, kiam ŝi estis dekjara, oni forveturigis en la urbon, en la eklezian lernejon; sed ŝi ne estis en ĝi eĉ tri jarojn,

oni ŝin resendis al patro, pro « nebonkonduo kaj malsukceseco ». Nu, jam ĉirkaŭ tri jaroj pasis, de kiam Monjo estas hejme. Faris Monjo florojn kaj kantis :

Super tombo kvieta  
Floris rozo beleta ;  
Vojranto soleca  
Ŝiris ĝin senparenčan . . .

Venis al la tablo ankaŭ Ksenio, prenis en la manon floron, ekrigardis ĝin kaj diris :

— Ha ! tiu ĉi estas, mi vidas, malvo ; jen tiu — lilio, tiu ĉi — dalio ; kaj tiu ĉi, kio ĝi estas ? — ŝi prenis en la manojn iun nekonatan floron.

— Ĝi tiel . . . — diris Monjo, — ĝi estas mia fantaziaĵo.

— Jen ! . . . Unufoje mi vidas, kiele floras fantaziaĵo . . .

— Verŝajne vi vidis ĝin en la urbo, — en orangejo ? — demandis Ksenio kaj demetis la floron.

Monjo nur ekridetis.

— Panjo, ni iru teon trinki, ĉar ĝi, verŝajne, estas preta, — diris ŝi kaj iris al la samovaro.

La tuta familio sidigis ĉe tablon. Ksenio plenverŝis la glasojn kaj la tasetojn, kaj Eŭdokio Gerasimovna donis al ĉiu po peceto da sukero kaj diris :

— Trinku teon kaj iru dormi, ĉar la patron, antaŭvideble, ni ne ĝisatendos. Ksenio, ekrigardu en la fenestron, ĉu eble li ne revenis ?

Ksenio ekrigardis tra la fenestron kaj diris :

— Ne, ne estas.

La etularo, fintrinkinte la teon, disrampis ien ajn, por dormi. Monjo denove sidigis ĉe siajn florojn, Eŭdokio Gerasimovna riparis al iu el la knaboj pantaloneton, kaj Ksenio laboris jen en la ĉambro, jen en la korto.

Dzvinka kaj Stribunec trankvile dormetis sub la tablo.

En la korto io ekbruis. Poste ekknaris la vestibla pordo. Dzvinka kaj Stribunec eksaltis kaj ekbojis.

Enpensigis super sia riparo Eŭdokio Gerasimovna. Ŝi aŭdis nek la frapadon en la korto, nek la knaron de la pordo.

Ŝi pensis pri sia vivo malbonsorta . . .

Ne gaja estis ŝia infaneco, ne gaja ankaŭ la knabineco. Patro ŝia, Gerasim Filimonoviĉ Skoroskok-Ĉornosaĉenko, estis iam kanoniko ; li servis en la regimento kiel muzikisto, kaj vera li estis muzikisto. Ludis violonon, gitaron, diversajn muziktubojn kaj flutojn. Fininte la servon kaj ekŝiginte, li dungigis kiel kapelestro al iu riĉa sinjoro, kiu havis proprajn muzikistojn, tridek homojn ĉirkaŭe. Tedis lin « barktiristeco », kaj li edzigis. Prenis por si edzinon, sed ne prenis la bonsorton . . . Li edziniĝis knab-

inon el burĝoj, Anastasion Artemovna; estis ŝi knabino jam grandaĝa, ĉiam malsanema, kolerema kaj insultema. Kaj fordonis li sian liberecon ne pro ekflaro da tabako!...<sup>(1)</sup> Saman tempon, kiam li edziĝis, li havis kvardek jarojn ĉirkaŭe, nu, kaj la junulino verŝajne jam tridek paskpanojn formangis<sup>(2)</sup>. Homo li estis trankvila, silentema, li ŝatis ekdrinki pokalon da brando, — pro tio li « ricevadis » de lia Anastasio Artemovna. Do, kiam ŝi tro tedis lin, — li prenadis sian violonon kaj ludis aŭ elsilikigis fajron kaj ekfumis pipon. Pipon li havis bonan, veran « Zinjkivka'n »<sup>(3)</sup> kun arĝenta kovrileto kaj ĉenetoj. Metis la kubutojn sur la genuojn, apogis la kapon — kaj fumis, fumis... Kaj iafoje neobeema larmo gutis el liaj okuloj, fluis tra la vango, falis sur la grizan lipharon kaj forruliĝis ien planken...

Malbonsorta estis la vivo de la juna Eŭdonjo ĉe siaj propraj gepatroj. La patro trankvila kaj pacema, ĉiam silentis; sed la patrino malsanema, kolerema, senĉese insultadis la patron kaj Eŭdonjon.

« Nu, ke mi edziniĝu kiel eble plej baldaŭ! » — pensis Eŭdonjo, — « por ke mi foriĝu de tie ĉi, ĉar estas malfavore kaj maldolĉe! »

Kaj baldaŭ ŝia deziro plenumiĝis. Ŝin edzinpetis psalmolegisto Andronik Polikarpoviĉ Bogdannij.

Komencis li iradi ne ĉe ŝin, — sed ĉe ŝian patron: lin tre interesis la muziko de la patro de Eŭdonjo. Estis, ke ili kunvenos, kaj ĉiam provas diversajn muzikilojn, ludas por si; Andronik havis bonan voĉon, estis ke li ekkantas kun gitaro. Por Eŭdonjo, tiu ilia muziko estis indiferenta: ŝia naturo ne similis la patran, sed la patrinan, iafoje ili kune diras: « Nu, por kio do fuŝludi kaj ludaĉi! tedis jam ĉio ĉi-tio, trankvilon oni ne havas en la hejmo! »

Sed Andronik ĉiam pliigis. Poste la homoj konsilis al li svatigi Eŭdonjon. Ŝi tiam aspektis sufiĉe bone, ŝi estis juna, nigrobrova, sur la vizaĝo ruĝeco ludis...

Eŭdonjon oni edzinigis je Andronik. Kaj iĝis ŝi jam Eŭdokio Gerasimovna, sinjorino por si mem en la domo sia, — antaŭe « psalmolegistedzino », kaj plue « diakonedzino ». Sed poste ŝi ekvidis, ke ne granda lukso estis destinita por ŝi en tiu, kvazaŭpropra hejmo: ŝi naskis infanojn, unu post la alia; la sufiĉeco malgranda, — la paroĥo ne granda, enspezoj bagatelaj... Andronik Polikarpoviĉ ne multe penis por tio, ke al li pli bone

(1) Ukraina esprimo, kiu signifas, ke li fordonis sian liberecon « ne pro io ajn ».

(2) T. e., ke ŝi jam havis ĉirkaŭ tridek jaroj.

(3) Famaj Ukrainaj pipoj, el la urbeto Zinjkiv.



estu, kiel mastro li estis ankaŭ maldiligentema, — li ne havis tion en la pensoj. . . . « Jen, nur scias sian kantadon kaj ludaĉon ! » Lin tiel riproĉadis la edzino kaj insultadis. Li do lasis ĉion kaj foriradis al la baptano Afenogeno (tiu ludis harmonikon). Ne ŝatis tiun Afenogenon la diakonedzino ; « drinkegulo » ŝi nomis lin, kaj vere li tute volonte drinkis . . . kaj la diakonon li alkutimigis al la pokalo, — li diradis, « pro malĝojo ! »

Iafoje ŝi komencas riproĉi la edzon, sed li nur verson respondas : « ne komprenas ci mian animon ! » . . . kaj foriras.

*El la ukraina lingvo tradukis ANATOL KOH.*

*(Fino en la venonta numero.)*

---

## EN LUMTURO

---

La loko de tiu — tute vera — sceno estas la lumturo de *Kerdonis*, en la malgranda insulo *Belle-Isle-en-Mer*.

La 18-an de Aprilo matene, la gardisto *Matelot* estis puriganta la aparatojn de la lanternoj je intermita lumado, kiam li sentis sin malsana. Li daŭrigis sian laboron ĝis la tagmezo. Tiam la sufero estis pli forta, ol li ; li devis enlitigi, penante tamen trankviligi pri sia farto sian edzinon kaj siajn kvar infanojn.

Sed baldaŭ la mizera virino ekvidis, ke li estas gravege malsana. Kion fari en tiu soleco, apud la lito de mortanto ? Kiel certigi la daŭrigon de la lumtura servado ? Ĝi estis la unua penso — simpla kaj altega — de tiu ploranta virino : la lanterno ne estas lumigata !

Ŝi do lasis siajn infanojn en la ĉambro, jam preskaŭ mortĉambro ; ŝi kuraĝe supreniris en la turon kaj ekbruligis la meĉojn de la lanterno. Farinte ĉion necesan, por ke la alproksimiĝanta nokto estu lumigata, ŝi revenis apud la funebran liton kaj havis la tempon fermi la okulojn de la mortinta edzo. . .

Ankoraŭ ne finiĝis la tragedia sceno. Meze de la plo-roj de la postvivantoj, kiuj por la lasta fojo rigardas la vizaĝon de la amegata edzo kaj patro, aŭdiĝas infana voĉo : « Patrino, la lanterno ne turniĝas ! »

Ĉe tiu ĉi averto, la malĝoja patrino subite reakiras sian energion. Se la lanterno « ne turniĝas », la ŝipanoj sur maro povos kunmiksi ĝin kun ia fiksa lumo, kaj tiel

trompiĝi, elvojiĝi, veturi al la danĝero en la ventega minacanta nokto. . . .

Denove, ŝi forlasas la ĉambron kaj suprengrimpas al la vojmontra lanterno. La radaro malbone funkcias, ĉar la malsaniĝinta gardisto ne havis la tempon ĝin plene aranĝi. Tiam ŝi vokas al si siajn du plej aĝajn filojn (du hometojn, el kiuj la pli granda estas apenaŭ dek-jara); kaj solaj meze de la nokto, supre sur la turo, en la malvasta « lumĉambro », de la 9-a vespere ĝis la 7-a matene, la du infanoj, per la tuta forto de siaj malgrandaj brakoj, turnis la maŝinon por movi la lanternon.

Dank' al tiu kuraĝa virino kaj al la du bonrasaj bravuletoj, la servado de la lumturo de *Kerdonis* ne suferis interrompon.

SAM. MEYER.

---

## TRANSPLANTITA IDEO

---

Cigano, reiranta hejmen en sian tendon konstruaĉitan ĉe la ekstremaĵo de la vilaĝo, preterpasis la domon de mastro Andreo. La enirpordo estis malfermita, regis silento kaj mallumeto, kaj la cigano ekvidis grandan kupran kaldronon metitan al la enirejo. Neniu persono ĉeestis. Jen alloga cirkonstanco! Nu, tian cirkonstancon oni nepre devas utiligi. La cigano do forŝtelis la kaldronon.

Baldaŭ mastro Andreo rimarkis la ŝtelon (ne la ŝtelinton), kaj li tuj anoncis ĝin al la ĝendarmoj, kiuj promesis traesplori ĉies domojn en la vilaĝo, por trovi la kaldronon. Aŭdinte la famon, la cigano ektimis. Unumomente li pensis kaŝi la kaldronon, sed li tuj konfesis al si, ke tio estas neebla en lia malgranda, mizera tendo. Li do decidis, ke li reportos ĝin en la domon de mastro Andreo; sed tio devos okazi de neniuj rimarkeble. Ne konante sufiĉe la domon de mastro Andreo, estis necese, ke la cigano ĝin traesploru, por ke, dum la nokto, li senbrue povu efektiviĝi sian « malŝtelan » intencon. Li do iris al mastro Andreo, kun preteksto interbabili kun li.

— Nu, mastro, — komencis la cigano, — mi aŭdis, ke oni forŝtelis vian kupran kaldronon.

— Jes, jes, — respondis la vilaĝano, — ĝi estas perdita por ĉiam.

— Ne por ĉiam, mastro. Vi ja anoncis la ŝtelon al la ĝendarmoj; ili certe baldaŭ retrovos ĝin ĉe la ŝtelinto.

— Neniam, — respondis mastro Andreo. — La ŝtelinto tre

bone scias, ke la ĝendarmoj serĉas ĝin; li do estos tiel ruzprudenta, ke li dispecigos la kaldronon kaj vendos la pecojn al kupristo.

— Jes, efektive, — diris la cigano, — li tion faros.

..... Mastro Andreo estis prava: li neniam ricevis reen sian kaldronon.

PAUL DE LENGYEL.

---

## TRI

De B. JOJÍČEK.

Foje rakontis unu muŝo al la formikoj, ke sub la arb-aro, apud la kamplimo, staras enhavoriĉa korbo da dolĉaj restaĵoj de tagmanĝo. Tri formikoj tuj rapidmigris tien. Sed apenaŭ ili transpaŝis la sojlon de la formikejo, la formikoj komencis disputi inter si. La unua tro rapidis kaj trudis la aliajn: « Ju pli frue oni tien alvenos, des pli bone estos. Ni ja ne povas scii, kiu nin antaŭiros. La ripozo nin certe ne forlasos. » — La dua, kiu tute ne zorgis pri tio, paŝis kaj paŝis tiel, kiel oni diras, « per sia propra pezo ». — La tria formiko denove restis por ripozi antaŭ ĉiu monteto, ĝi diras: « Kial tiel rapidi? Per granda rapideco la piedoj facile kaj senbezone malfortiĝas. Por rapidi estos ĉiam sufiĉe da tempo, ĝis kiam la devo tion permesos. »

Tiel niaj bonaj formikoj disiris.

La tuta afero eble finiĝis: La unua formiko dum ĝia migrado mortfalis meze de la vojo, ĉar siaj fortoj estis tute elĉerpitaj.

La dua atingis sian celon. Apenaŭ kiam ĝi kaptis nur unu peceton da dolĉaĵo, venis homo kaj forportis la korbon.

Kompreneble, tiu, kiu pli multe sidis ol iris, alvenis al la celo kiel oni diras « per kulero post la manĝado », ĝi forkuris nur tiam, kiam ĝi aŭdis homajn paŝojn.....

Kiam tiun ĉi rakonton la plej maljuna formiko finis en la formikejo, subite ekkriis unu malgranda formikido:

« Tio ĉi estas tre stranga fabelo! »

Sed la maljuna sprite ĝin silentigis per la vortoj:

« Tiu ĉi fabelo estas nur por tiuj, kiuj scias bone pri-pensadi. »

*El la bohema lingvo tradukis* EMAN. KUBÁSEK.

---

## FELIETONO

### Ho amo!

De Umer Sejfedin.

Mi renkontis cin en la imago de l'aliaj poetoj kaj mi falis en entuziasmon!

Ĝi ne estis poeta fantazio, sed cia vera vizaĝo, kiu aperis al mi sonĝe.

Sub la superfluo de miaj sentoj mi ekkredis, ke mi estas amata de miloj da jaroj ree, ho dolorema amo! Ci prezentigis al mi en miloj da vizaĝoj! Mi serĉis lumon en cia ombro, sed ho ve!... mi komprenis poste, ke ankaŭ ci estas nur mensogo, simile al la vivo. Kaj ci ne ekzistadas!... Malgraŭ tio, tiu ĉi eltrompo aldonas al ci ankoraŭ pli grandan koston.

Sed, se ci ekzistas, tiam, pro Dio, neniam ci al mi aperu, ne igu min renkonti cin, restu eterne por mi nekonata!...

*El la bulgara lingvo tradukis GAVRAIL POPOV.*

### La konvolvulo kaj la saliko

Konvolvulo estis kreskinta sub densa plekto-barilo. La malfeliĉa kreskajeto, ne havanta aeron aŭ sunon, rampis malvigle teren. Tro malforta por sin suprenlevi, li serĉis ĉirkaŭe subtenilon.

« Ho ve! ĝi diris, se mi povus iome supreniri tiun plekto-barilon, kiu min sufokas! Mi vidus sunon kaj povus flori. Blanka saliko, ĉu vi volas, aljetbranĉe, ke sur vi mi apogiĝu! »

La saliko klinas al tere unu el siaj flekseblaj branĉoj. La konvolvulo alkroĉiĝas, ĝi envolvas ĝian malfortan trunketon. Poste, el tiu branĉeto, ĝi sin antaŭen puŝas al dikaj branĉoj por ĉirkaŭpreni ilin per girlandoj kaj, ĉie tramiksi sian verdan foliaron kun arĝentkolora foliaro de l'arbo.

Kaj dum la tuta somerò, ni vidis la salikon ornamitan per centope bluaj sonoriletfloroj, gracie pendantaj el ĝiaj branĉoj. De malproksime tiuj floroj ŝajnis ĝiaj.

Unu donis sian apogon, returne alia donis sian belecon.

*Tradukis J. GIRAUDET.*

### Por la « plibonigemuloj »

En la maja numero de « Belga Esperantisto » ni legas la sekvantan spritajon, kiun ni represas tie ĉi, rekomendante ĝin al la atento de « plibonigemuloj », « ŝanĝemuloj » kaj « novvortfaristoj »,

kiuj pretendas, ke Esperanto ne estas perfekta, kaj pro tio, ĝin konstante penadas « plibonigi » kaj « riĉigi » :

*La pastro* : Diru, Peĉjo, la kvaran versaĵon de la « Patro nia ».

— *Peĉjo* : Panon ĉiutagan nian donu al ni hodiaŭ, kune kun tranĉo da ŝinko. — *La pastro* : ??? Kun tranĉo da ŝinko ? — *Peĉjo* : Jes, sinjoro pastro ; jen malgranda plibonigo de mi.

## BIBLIOGRAFIO

*La eldonantoj, kiuj deziras, ke ni raportu pri iliaj eldonaĵoj, estas petataj ĉiam sendi donace al la Redakcio po du ekzempleroj de ĉiu verko.*

**Funebra Parolado pri Louis de Bourbon, Princo de Condé**, de BOSSUET, el la franca lingvo tradukis LOUIS BASTIEN. 69 p. 12 × 17. — Paris, Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède. Prezo : 1 fr.

Vera majstroverko de la elokventa oratoro, klarigata per tre interesa antaŭparolo. Bonstila, Fundamento-fidela estas la traduko, pri kio plej bona garantio estas la nomo de la tradukinto kaj la eldoninto.

**Kelkaj vortoj pri Teosofio**. Parolado farita la 11-an de Aprilo 1911 ĉe la Esperantistaj Mondumaj Kunvenoj en Paris, de S-ino DIOU-TRUILLON. 15 p. 13 × 20. — Paris, Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède. Prezo : 25 centimoj.

Ĉiu esperantisto rapidu aĉeti tiun ĉi tre malkaran, bonstilan broŝureton, por konatiĝi kun la noblaj ideoj de l' Teosofio.

**La Elementoj kaj la Vortfarado**, *Gramatiko kaj sintakso en Esperanto*, de E. ĈEPEČ. 64 p. 12 × 18. — G. Warnier & K<sup>o</sup>, 15, rue Montmartre, Paris. Prezo : 750 spesoj.

Altvalora verko, kiu estas la rezultato de profunda scio kaj diligenta laboro. Ni devas ne nur gratuli, sed ankaŭ varmege danki la ĉiekonatan faman aŭtoron pro lia tre utila libro, per kiu li faris gravan servon al nia afero.

**Turismo ĉe la Fervojo de Paris al Orléans**. 24 p. 14 × 24. — Eldonita de la Fervoja Kompanio « Paris-Orléans ».

Informa broŝuro, kiu konigas per esp. teksto, bildoj kaj geografiaj kartoj la regionojn estantajn ĉirkaŭ la nomita fervojo. La libreto estas tre lukse presita ; el tipografia vidpunkto ĝi estas vera majstroverko. La broŝuro estas sendata senpage kaj afrankite al kiu ajn ; adreso : « Fervoja Kompanio de Orléans (Compagnie du Chemin de Fer d'Orléans), Bureau du Trafic-Voyageurs-Publicité, 1, place Valhubert, Paris ».

**Esperantista Kantaro**, aranĝita de KARL JOST. 40 p. 11 × 15. — Universala Esperanta Librejo, Genève, 10, rue de la Bourse. Prezo : 1 fr. (40 Sd.).

17 kantoj originalaj aŭ esperantigitaj, kun kvarvojaĵ muziknotoj.

**Demandaro pri la Historio, Literaturo kaj Organizaĵoj de Esperanto, por Esperantaj Ekzamenoj**, de R. DE LADREVEZE. 88 p. 11 × 16. — Friedr. Ader, Esper.-Verlag, Dresden A. Prezo : 1 M. (50 Sd.).

Tre taŭga kaj konvena al sia celo, tiu libro estas vere rekomendinda kaj ĝia bone konata aŭtoro meritas dankon kaj gratulon.

**Gvidfolio tra Dresden**. 4 p. 11 × 16. Eldonita de la tiea gastotablo sub la aŭspicioj de U. E. A.

Utila folieto, laŭ la formato de aliaj gvidfolioj.

**10-spesdeka Biblioteko Esperantista** estas fondita de la Esperanto-Propaganda Instituto en Leipzig (Kaiser-Wilhelm-Str. 15), el-

donanta utilajn broŝuretojn (11 × 16, prezo po 10 Sd.). Tri broŝuroj eliris ĝis nun: 1) D-ro Zamenhof: Kongresa Parolado en Washington; 2) Prof. P. Christaller: Propraj nomoj en Esperanto; 3) Heinr. Heine: Libro de kantoj (unua serio), trad. de famaj esperantistoj.

**En Harmonio kun la Eterneco**: *Paco, Forto, Feliĉego*. De RALPH WALDO TRINE, kun la permeso de la aŭtoro tradukita de FREDERIK SKEEL-GÖRLING. 124 p. 13 × 18. — London, G. Bell & Sons, Ltd., Portugal Street, Kingsway. Lukse bindita; prezo: 1 s. 6 d.

Jena altvalora verko estas jam tradukita en multajn naciajn lingvojn, kaj ni plezure akceptas la esperantan tradukon, kiun faris nia neforgesebla dana samideano.

**Komerca Korespondo**, kunmetis J. BOREL. Esp. Bibl. Int. N° 16. 48 p. 10 × 15. — Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin S. W. 68, Lindenstrasse 18-19. Prezo: 0,10 Sm.

Korespondaj modeloj por la plej oftaj bezonoj de l'komerca vivo.

**Konsiloj pri higieno**, de R. STOLLE, tradukis J. BOREL. Esp. Bibl. Intern. N° 17. 48 p. 10 × 15. — Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin S. W. 68, Lindenstrasse 18-19. Prezo: 0,10 Sm.

Ne nur junuloj, sed ankaŭ maturaĝuloj kaj maljunuloj kun utilo legos tiun ĉi tre praktikan konsilaron pri sano.

**Vichy**, *Gvidlibreto*. Publikigita sub la aŭspicioj de la Farma Kompanio de « Vichy-Etat ». Somera sezono 1911. 24 p. 9 × 15. — Senpage po 10, 20 aŭ 30 ekzempleroj al Esperantistaj Grupoj.

Esperanta plenteksto eldonita de la urba Esper. Grupo, ilustrita per planoj kaj desegnoj. Sin turni al la ĝenerala sekretario de la G. E. V. S-ro Céard, 48, boulevard Carnot, Vichy (Francujo).

**Malgranda Biblioteko N° 1**. 30 p. 8 × 14. Eldonaĵo de « Hungara Studento, Budapeŝt VII, Alpár-utca 8. Prezo: 15 Sd.

La enhavo de tiu ĉi broŝureto estas: Trezoro de la Rajaho, Poeĵoj, Hungar-kronika bildo, Humoraĵoj.

**Ondino (Undine)**, de FRIDERIKO BARONO DE LA MOTTE FOUQUÉ, el la germana originalo tradukis K. MYSLIK. 55 p. 16 × 24. — Esperanto-Buchhandlung A. Schönfeld, Wien, IX., Universitätsstrasse 8. Prezo: K. 1,20 (Sm. 0,50).

Varme ni rekomendas tiun ĉi ĉarman rakonton, kiu prave estas nomata rava juvelo en la trezoro de la germana literaturo.

**The « Huddersfield »**, *Collection of Favourite Songs*. 24 p. 14 × 21. — Aĉetebla ĉe S-ro J. H. Fitton, 2, Stanley Street, Lindley, Huddersfield. Prezo: 0,16 Sm.

Jena luksa muziklibreto enhavas 15 kvarvoĉajn kantojn esperantajn.

**Internacia Higiena Ekspozicio**, Dresden, Majo—Oktoebro 1911. 24 p. 16 × 23.

Tiu ĉi interesa broŝuro ilustrita estas ricevebla por unu internacia respondkupono. Sin turni al D-ro SCHRAMM, Dresden 20 (Germanujo).

**Aline**, svisa rakonto, de C.-F. RAMUZ, tradukita de RENÉ DE SAUSSURE. 138 p. 12 × 19. — Genève, Universala Esperantia Librejo, 10, rue de la Bourse. Prezo: 1 Sm. (afrankite).

Oni povas kore danki nian fervoran, aĝeman Akademianon, kiu, per la ĵus aperinta traduko de tiu ĉi kortuŝa, vivofidela kaj detaliĉa rakonto, pliriĉigis nian literaturon.

---

**EKZAMENO.** — Nia juna amiko kaj energia propagandisto *Edmond Privat*, unu el la fondintoj de « Juna Esperantisto », ĵus sukcesis en la Pariza Sorbonne la ekzamenon « licence ès-lettres ». Li nun intencas prepari doktoran tezon pri artefarita lingvo kaj Esperanto. Sinceran gratulon al nia brava, fidela kunbatalanto!



## PEDAGOGIA FAKO

(Volonte ni respondas al niaj abonantoj en tiu ĉi rubriko iliajn lingvajn demandojn komune interesajn.)

**Forpermesi.** (Responde al S-ro O. N.) — La senco de tiu ĉi kunmetita verbo estas : liberigi dungiton el la servo (aŭ ofico), por difinita tempo. Tiu ĉi vorto apartenas al la Universala Vortaro ; ĝi estas iom figura, sed tamen tute perfekta, ĉar la vorto « permesi » esprimas konsenton pri senigo de devo, laboro, ŝarĝo ; kaj la « for » — delason de la loko (laborejo, oficejo...).

La ideon « definitive forpermesi, por ĉiam forpermesi », oni esprimas per la vorto « maldungi ».

**Alloga.** (Resp. al tiu sama.) — Alloga estas io, kio enhavas en si la econ de tiel altgrada plaĉo al iu, ke tiu ĉi, sen ia speciala antaŭintenco, sentas la emon ĝin posedi, havi, uzi aŭ ĝui laŭ ĝia naturo. Ekzemple : bela, matura, ruĝa pomo estas alloga por fruktoŝatanto ; bone redaktita gazeto estas alloga por la leganto ; laŭmodaj ĉapeloj estas allogaj por la virinoj ; la instrumaniero de lerta profesoro estas alloga por la studentoj ; herboriĉa liberĉampo estas alloga por ekskursantoj ; — la vivo ne estas alloga por mizeruloj ; vermoplena putra frukto estas malalloga por la manĝonto, k. t. p. — Figure, oni povas diri « alloga » ankaŭ pri persono, aludante pri ĝia koncerna *eco* ; ekz. la infano estis tiel alloga (t. e. bela, ĉarma, aminda), ke mi ne povis min deteni kisi lin ; tiu aktoro estas alloga (t. e. li ludas bone, plaĉe, artece).

---

## HUMORAĴOJ

---

**En oficejo.** — *Kontorestro* (al la praktikanto, kiu fajfetas operan arion) : He, junulo, ĉu vi ne scias, ke ne decas fajfi dum la laboro? — *Praktikanto* : Tre ĝuste, sinjoro ; mi ja ne laboras.

**Malgranda historio.** — « Panjo, ĉu vi ŝatas historiojn? » — « Jes, mia fileto ; kial vi demandas? » — « Tial, ke mi scias unu. » — « Ha, rakontu do ĝin, karuleto. » — « Nu, jen : estis iam telero, ĝi kuŝis sur tablo... kaj poste... estis malgranda knabeto, kiu ĝin rompis.... » Kaj la rakontanta bubeto humile rigardas teren.

**Ĉirkaŭvoje.** — *Sang* : Hodiaŭ mi renkontis vian similulon. — *Suc* : Vere? iun similtan al mi? — *Sang* : Tre similtan ; eĉ pri tio li similas al vi, ke li ankaŭ ŝuldas al mi dek spesmilojn.

**Duelo.** — Kurago, amiko ! Via kontraŭulo ja timas plie, ol vi ! — Neeble !

**Praktike.** — *Kliento* : Kiom kostas la pomoj ? — *Fruktovendisto* : Po unu spesdeko, kaj la kvinan mi donas senpage. — *Kliento* : Bone ; mi do prenos la kvinan.

**Ortografio en Esperanto.** — La malgranda Luciano, filo de lignohakisto, skribas sian hejman lecionon.

— Patro, — li demandas subite, — ĉu la vorton « *malluma* » oni devas skribi kun unu aŭ kun du *l*-oj?

— He, bubo, — respondas la patro, — ne estu tiel mallaborema ; dum vi tion demandas, vi povus skribi eĉ tri *l*-ojn.

**Motivo.** — La 8-an de Julio 1911, kiel oni legis en la ĵurnaloj, estis tertremo en Hungarujo. La sekvintan tagon tajloro vizitis junan aktoron, prezentante al li tuj pagotan fakturon.

— Pardonu, sinjoro, — diris la aktoro, — mi ne povas pagi hodiaŭ, ĉar hieraŭ la tertremo elskuis la monon el mia poŝo.

**Profitige.** — *Ŝi*: Vian fianĉan ringon mi redonas al vi; mi edziĝos kun alia viro. — *Li* (tragike): Lia nomo? lia nomo kaj adreso? — *Ŝi*: Lin mortigi vi volas, ĉu ne? — *Li* (tre flegme): Ne; sed mi volas vendi al li la ringon.

**Libertempajo.** — « Se mi iros al kamparo, mi elektos akvohavan landon. » — « Ha! vi estas fiskaptema? » — « Ne, sed mia filino pentras akvarelojn. »

**Akurateco.** — « Kien vi rapidas tiel senmodere? » demandas sinjoro sian amikon kurantan sur la strato. — « Al la enterigo de mia mastro, — respondas la amiko; — la ceremonio komenciĝos post kvaronhoro, kaj mi devas rapidegi por alveni ĝustatempe. Vi ja konis mian mastron; li estis ĉiam furioze kolera kontraŭ malfruantoj. »

---

## NIAJ KONKURSOJ

*Kutime ni donas ĉe ĉiu konkurso du premiojn al la partoprenantoj de niaj konkursoj, t. e. 1) el libroj eldonitaj de Presa Esperantista Societo, en valoro de 2 S, — 2) samon en valoro de 1 S, — laŭ elekto de la premiotoj.*

**HAZARDA KONKURSO.** — Antaŭdivenu: kiom da personoj partoprenos en jena konkurso.

De ĉiu persono ni akceptas nur po unu respondo, en kiu klare devas esti skribita iu nombro supozata. La premiojn ricevos tiuj du personoj, kies respondoj estas trafaj aŭ plej alproksimantaj la realecon. En okazo de *ex æquo* la sorto difinos. Oni bonvolu sendi la respondon al ni antaŭ la 1-a de Oktobro 1911. Ni publikigos ilin ĉiujn.

Ni esperas, ke multaj el niaj legantoj partoprenos en tiu ĉi kurioza konkurso tute hazarda, bezonanta nenian specialan scion aŭ spertecon.

En nia aprila konkurso partoprenis 59 personoj kun 76 respondoj. La unuan premion ni aljuĝis al S-ro Voloŝin, la duan al F-ino Odette Meyer. — La nomaron de la partoprenintoj, kune kun kelkaj respondoj, ni publikigos en la venonta numero.

---

## Korespondado de la Redakcio.

*T. J. ŝ. (K.)* — Koran dankon por via afabla letero stenografia. La kunfandiĝo de la du societoj surprizis nin, sed ni esperu, ke ĝi alportos bonajn fruktojn al nia afero. Pri la demandita studo ni legis sciigon nur en la de vi citita gazeto. La « karta » anekdoto antaŭ ne longe aperis en unu esp. gazeto. — Amikan saluton!

*F-ino N. P.* — Baldaŭ ni presos ilin.

*R. H.* — Kion signifas via letero? ĝi ne povas esti adresita al ni, nek dediĉita por enpresado en J. E.! Eble vi erare sendis ĝin al ni.

---

— Laŭ la decido de la Administrantaro de Presa Esperantista Societo, « Juna Esperantisto », kiel preskaŭ ĉiuj esp. gazetoj, ne aperos en Aŭgusto. La preskisma numero aperos do en Septembro; ĝi ampleksos 20 paĝojn.